# ESTRARA JARRAPORTO DE ILEI
# POR LA KOMITATKUNSIDO DE LA 21-A DE JULIO 2025

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI de 8-2024 al 7-2025

**ENHAVTABELO:**

**MEMORO:**

**Nia memoro iras al la kara Renato Corsetti, kiu forpasis en 2025 kaj kiu multege helpis la Ligon. Al li estis dediĉita numero de IPR.**

**EVENTOJ**

ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2024; ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2025; ILEI-Kongreso 2026

**INSTANCOJ**

Estraro, Komitato, Sekcioj

**PROJEKTOJ**

Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj"; "30 Oraj Horoj"; Tutmonda Komuna Legado; Homa Ĉeno kaj aliaj video-projektoj

**KAPABLIGO**

Tago de Lernado; Universitata Agado; Afrika Agado (Aruŝo, Benino, Burundo); Miksitaj kursoj por vidantoj kaj ne-vidantoj en Serbio; Eldonado: libroj (*Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-2023*; antologio de la plej bonaj artikoloj de IPR zorge de Fernando Pita; bita kaj papera versio de la verkaro de Antonietta Bernardoni en ĉina traduko; bita versio de la lernolibro de Joel Muhire; Raporto de la Evento por la Internacia Virina Tago); IPR; JA; ILEI en la Reto

**PREMIOJ**

Premio La Torre kaj ties libro; Premioj "Instruisto de la Jaro" kaj "Juna Instruisto de la Jaro"

**KUNLABORO KUN ENMOVADAJ INSTITUCIOJ**

UEA, TEJO, edukado.net

**KUNLABORO KUN EKSTERMOVADAJ INSTITUCIOJ**

UNESKO, FIPLV (kaj FUEL Magazine), Ĉina Komunikila Grupo, Universitato Adam Mickiewicz, Universitato de Zaozhuang

## EVENTOJ

### ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2024:

Sukcese pasis la 57-a kongreso de ILEI en la turisma urbo Maceió, Brazilo, kun bunta kaj varia programo, kiu inkluzivis interesajn prelegojn, belajn ekskursojn kaj altkvalitan muzikon. Ĝin partoprenis 83 esperantistoj el kvar kontinentoj. La ĉeftemo estis "Esperanto por justa edukado". La tradicia simpozio,

organizita de Fernando Pita kun la helpo de Laura Brazzabeni kaj Alessandra Madella, havis la temon "Lingvoj de instruado kaj justa edukado". Detalan raporton prezentis la Prezidanto de LKK Aristóphio A. ALVES FILHO en la revuo "Esperanto" kaj IPR, numero 2024-3. La rezolucion de la Kongreso eblas legi ĉe: https://sezonoj.ru/2024/07/ilei-33/ Inter la plej gravaj rezultoj de la Kongreso, kiu havis tre buntan programon, estis:

a) hibrida Komitatkunsido

b) la Simpozio, kies ĉef-preleganto estis Ilona Koutny kun prelego pri István Szerdahelyi, ŝia instruisto, kiu estis prezidanto de ILEI. Prelegis ankaŭ brazilaj fakuloj kaj aktivuloj. Dum la Simpozio, Alessandra Madella prezentis la libron de la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-2023*.

c) interesaj prelegoj pri la kongresa temo, inkluzive pri la historio de "Bona Espero" fare de Ursula Grattapaglia

d) seminario "Interkultura komunikado: manĝetiketo", zorge de Alessandra Madella kaj Arko Gong, kiu estis ankaŭ parto de la programo de "Virina Agado," al kiu kontribuis ĉeeste per tri prelegoj Ariadna Garcia Gutierrez el Kubo.

e) kunlaboro kun lokaj aŭtoritatoj kaj universitato

La Kongreso estis nek profita nek malprofita, kio estas bona rezulto por ILEI-kongreso ekster Eŭropo. Pluraj videoj spekteblas en la jutuba kanalo de ILEI ("Esperanto + edukado ILEI")

**ILEI-Kongreso kaj -Simpozio 2025:**
La 58-a ILEI kongreso okazos en Beogrado, Serbio, inter la 19-a kaj la 29-a de julio 2025, tuj antaŭ la UK en Brno, al kiu veturos karavano. LKK prezidas Aranka László, la sekciestrino de ILEI en Serbio. Multe aktivas de la estraro Radojica Petrović kaj la estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni. La ĉeftemo de la kongreso estas "Artefarita Intelekto kaj Lingvolernado". Kiel kutime, multas lingvokursoj, koncertoj kaj turismaj oportunoj. Alessandra Madella prezentos seminarion pri la *Fedro* de Platono kiel vivanta fonto de niaj ideoj pri komunikado, adaptitan de ŝia kurso "Kernaj Konceptoj pri Komunikado" por la studentoj de la Esperanto-fako en Zaozhuang-a Universitato. La Kongreso de ILEI estis prezentata de estraranoj kaj LKK-anoj dum pluraj eventoj, kiel interalie la ĉiumonata renkontiĝo de IKEF kaj la Virtuala Kongreso de UEA.

La Simpozio 2025, organizita de Alessandra Madella kiel sola respondeculino, havas la temon "Artefarita Intelekto kaj Kulturo." Ĝi okazos en la posttagmezo de dimanĉo la 20-a kaj ĝi interparoligos profesorojn el universitatoj de Bosnio, Ĉinio, Hispanio, Japanio kaj Usono, en la angla, japana kaj Esperanto (kun interpretado al Esperanto), espereble kun aktiva partopreno de la publiko. Tiu aliro estas laŭ la tradicia celo de la simpozioj de ILEI dialogigi la esperantistan kaj neesperantistan flankojn, kaj konigi Esperanton en scienculaj medioj ekster Esperantujo. Alessandra Madella poste pretigos la *Aktojn de la Simpozioj de ILEI 2024-2025*.

**ILEI-Kongreso 2026:**
La ILEI-estraro ricevis oficialan leteron de la estraro de Zaozhaung-a Universitato en Ĉinio, pri la eblo organizi la ILEI-Kongeson kaj -Simpozion 2026 tie. Ses ĉinaj samideanoj, spertaj pri organizado de eventoj, pretas labori loke por pretigi la kongreson. Pli serioza negocado devas komenciĝi.

## INSTANCOJ

**Estraro:**
Dum la 57-a ILEI-kongreso estis elektita nova Estraro de ILEI por tri jaroj: 2024-2027. Prezidanto: Ahmad Reza Mamduhi, Irano; Sekretario: Elena Nadikova, Rusio; Estrarano pri Financoj: Karine Arakeljan, Armenio: Vic-prezidanto: Alessandra Madella, Italio; Estrarano pri Kongresoj: Laura Brazzabeni, Italio; Estraranoj: Marija Jerković, Kroatio; Aimé Patrick Manirakiza, Burundo; Radojica Petrović, Serbio, Fernando Pita, Brazilo. La nova estrarano, Aimé Patrick Manirakiza, zorgas precipe pri Afrika Agado kaj estas nia nova observanto ĉe TEJO.

La estraro regule kunvenas por pritrakti diversajn problemojn kaj trimonatajn estrarraportojn regule verkas Elena Nadikova kaj Alessandra Madella.

**Komitato:**
Komitat-kunsido okazis hibride la 22-an de julio 2024, 12:00-15:30 UTC dum la kongreso de Maceió, kun aprobo de jarraporto, financaj dokumentoj kaj gvidlinioj de la laborplano. Estis ankaŭ aprobita la restarigo de la sekcio de Kubo. La koncernaj dokumentoj troveblas en la retejo de ILEI : www.ilei.info.

**Sekcioj:**
Ĝis sia forpaso, Renato Corsetti helpis la estraranon pri landa agado Marija Jerković daŭre kontakti la sekciestrojn de ILEI, ricevante respondojn, kiuj ebligis koni pli funde la staton de la Ligo. Ĝisdatigita listo kaj adresoj de la sekciestroj kaj reprezentantoj troviĝas en la retejo de ILEI (https://www.ilei.info/instancoj/sekcioj.php)

## PROJEKTOJ

**Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj" : Lernu Esperanton en via lingvo:**
Pludaŭras la projekto, lanĉita de IrEA kaj celanta instrui Esperanton rete en lingvoj, en kiuj la instruado maloftas. En la jutuba kanalo de ILEI aperis registraĵoj de diverslingvaj A-nivelaj kursoj de Esperanto, kiel la kurso en la angla zorge de Aimé Patrick Manirakiza (19 lecionoj). La unua leciono de la kurso en la araba estas nun la plej spektata (kun 4767 vidoj) kaj komentata video el la kanalo. Ankaŭ registraĵoj de unulingvaj B- kaj C-nivelaj kursoj alŝutiĝas tien, kune kun instruado per Esperanto ekz. pri la svahila, interlingvistiko (de Ahmad Mamduhi, 23 lecionoj) kaj verkado (de Trevor Steele, 12 lecionoj). Ahmad Mamduhi, Alessandra Madella kaj Trevor Steele estis en la juĝkomisiono por la ekzamenoj de la retaj kursoj de Esperanto en la rusa, kiujn Tatjana Loskutova sukcese instruas kadre de EToSo.

**“30 Oraj Horoj”: Lerneja Projekto:**
La propono de Alessandra Madella pri prelego koncerne la projekton “30 Oraj Horoj” (lanĉitan kunlabore de ILEI kaj Itala Instituto de Esperanto), estis akceptita por la prestiĝa internacia konferenco EUROCALL pri la uzo de teknologioj en lingvoinstruado, kiu okazos ĉe Università Cattolica di Milano je la fino de aŭgusto 2025. Tio ebligos daŭrigi la rilaton kun EUROCALL, pri kiu UEA zorgis dum jaroj. UEA kaj ESF subtenos la partoprenon.

Marija Jerković tradukis al la kroata la libron de Alessandra Madella *Esperanto: Facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*, kiu ekis kiel la scienca dokumento de la "30 Oraj Horoj." La traduko estis eldonita de Kroata Dokumenta Centro, kun parta financa subteno de ILEI. La angla traduko survojas, same kiel la korea zorge de Chang Sumi.

**Tutmonda Komuna Legado:**
Por celebri la Tagon de la Esperanta libro/Zamenhofan Tagon 2024, zorge de Alessandra Madella, ILEI proponis du elektojn kun aktiviga celo. Temis pri la simbola tutmonda legado de la komenco de la teatraĵo "1910" de Ĵenja Amis, kun sugestoj kiel ludi ĝin, kaj de la rondiranta rakonto por virinoj "Pri viroj kaj kunikloj", iniciato de la nove restariĝinta Komisiono pri Virina Agado de UEA. Ĝis Julio 2025 aktive kunverkis 52 virinoj el 12 landoj (Armenio, Barato, Ĉinio, Francio, Italio, Japanio, Kanado, Koreio, Kroatio, Madagaskaro, PoIlando kaj Svislando). IPR kaj Ĉina Komunikila Grupo donis spacon al niaj iniciatoj por la Tago de la Esperanta Libro per intervjuoj, artikoloj kaj raportoj. La itala samideanino Claudia Maggi bele legis "Pri viroj kaj kunikloj" por Esperradio. La finita rakonto estos publikigita en la retejo de ILEI. Kunverkemulinoj—individue aŭ grupe—estas tre bonvenaj anonci sin.

**Homa Ĉeno kaj aliaj video-projektoj:**
Atingis sian 10-an parton la internacia Homa Ĉeno, kiel varb-rimedo en 2022 lanĉita de Maximiliano Garcia. Ĝi atingis sian unuan celon de 1 000 homoj, el 39 landoj. La deka parto jam spekteblas en la kanalo de Maximiliano Garcia en WeChat kaj spekteblos en la jutuba kanalo "Esperanto + Edukado ILEI" de la fino de Julio. Tie jam videblas ĉiuj antaŭaj naŭ epizodoj kaj jam ekis la filmado por la 11-a. Maximiliano Garcia kaj Alessandra Madella prezentis la Homan Ĉenon kaj la projektojn de Ma-Ga-Filmoj al pluraj publikoj, inkluzive dum la Irana Kongreso kaj la ĉiusemajna prelego organizata de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-a Universitato. Nun, kadre de Ma-Ga-Filmoj, Garcia okupiĝas kun Wei Ningna pri la projekto "Vojaĝo al Oriento", video-kurso en Esperanto pri la internacia mondo de teo.

## KAPABLIGO

**Tago de Lernado:**
Marija Belošević, kiel tradicie, organizis la Tagon de Lernado dum la UK de Arusô en Tanzanio. Ŝi faris tion ĉeeste en Tanzanio kaj eĉ memstare organizis elsendon per Zoom por la eksterkongresa publiko. La registraĵo de la Tago de Lernado spekteblas en "Esperanto + Edukado ILEI": https://www.youtube.com/watch?v=bDWIx4lMqOQ

Marija Belošević estas ankaŭ organizanta la Tagon de Lernado dum la UK de Brno, kun bunta programo.

**Universitata agado:**
La Universitata Laborgrupo multe perdis pro la forpaso de Renato Corsetti, kiu gvidis ĝin ekde la komenco. Prenis lian lokon Alessandra Madella, kun la helpo de Viko kaj Ahmad Mamduhi. La nova fokuso—sugestita de Viko, kiu mem zorgos pri la mediteranea regiono— estas pri la prezentado de areoj, kiel ekzemple la instruado de Esperanto kaj la agadoj de esperantistaj universitatanoj en Ĉinio aŭ Barato. Tiamaniere, la "Kunpens(ig)ado" povis daŭre kunsidi ĉiumonate per la Zoom-konto de IrEA kaj regule alvenis al la 62-a sesio. La registraĵoj de ĉiuj sesioj spekteblas ĉe la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5.

Post la somera paŭzo en Aŭgusto, la venontaj sesioj estas jam antaŭplanitaj ĝis Novembro. Sed homoj kun specialaj temoj kaj urĝaj anoncoj estas kiel ajn ĉiam bonvenaj.

La 7-an de Februaro 2025, Alessandra Madella prelegis pri sia animacio en Esperanto dum la internacia konferenco "Difference, Diaspora, and the Nation: The Politics and Aesthetics of Minoritarian Performance in 20th and 21st Century Italy" (Diferenco, Diasporo, kaj la Nacio: La Politiko kaj Estetiko de Minoritata Spektaklo en la 20-a kaj 21-a Jarcentoj en Italio) ĉe la Universitato de Milano. La 28-an de Junio 2025, ŝi prelegis pri "Esperanta tradukado kaj kreado de Ye Junjian" en la "Seminario pri Tradukado kaj Diskonigado de la Ĉina Kulturo en Esperanto", kiu okazis ĉe Zaozhuang-a Universitato kun la oficiala subteno de la Registaro de Shandong-Provinco. En la sama evento, Bak Giwan klere prelegis pri la nuna uzo de AI kaj la korea samideano Elpin, pri kiu ankaŭ donis gravajn informojn Choi Manwon. Semio prelegis pri la traduko de Mozi al Esperanto fare de Sasaki Teruhiro kaj Ardo pri la Esperantaj tradukoj de Konfuceo.

**Afrika agado:**

**<u>Aruŝo:</u>** Laŭ peto de UEA, ILEI organizis la lingvokursojn dum la UK de Aruŝa. Krom la progresinta konversacia kurso de Aurora Bute, instruis la elementan kurson Joel Muhire (ILEI-sekciestro de DR Kongo) surbaze de sia lernolibro de Esperanto en la svahila, papere publikigita de ILEI. Miora Raveloharison (ILEI-sekciestrino de Madagaskaro) gvidis trejnseminarion por instruistoj dum la UK kaj ILEI kontribuis finance subteni la Virinan Kongreseton, kiun ŝi organizis antaŭ la UK kun Alexandrine Omba, tiam ILEI-komitatano de DR Kongo.

**<u>Benino:</u>** ILEI kontribuis finance subteni la instruadon de Esperanto al lernantinoj en Benino, zorge de ties sekciestro, Latifou Gbadamassi. La subteno pludaŭras ĉi jaron kaj la kurso estis oficiale rekonita de landaj instancoj.

**<u>Burundo:</u>** ILEI kontribuis finance subteni la trejnseminarion por instruistoj de la nova estrarano Aimé Patrick Manirakiza en Burundo. La kurso celis naci-malplimultan komunumon kaj havis la rektan subtenon de la Ministerino pri Minoritataj Aferoj en Burundo. La sukceso de la kurso ebligis Aimé Patrick Manirakiza akiri rektajn kontaktojn kun la Ministerio pri Edukado, al kies funkciuloj li sukcese proponis la efektivigon de pli larĝa instru-projekto, kiu nun ekis kaj kiun ILEI parte finance subtenas.

**Miksitaj kursoj de vidantoj kaj ne-vidantoj en Serbio:**

Por bone pretigi la kongreson, serbaj samideanoj instruis plurajn kursojn de kaj en Esperanto samtempe por vidantoj kaj por ne-vidantoj, tiel akirante novajn spertojn en la kampo, kiun Aranka Laslo bone priskribis interalie en sia esplorraporto por Premio La Torre 2025.

**Eldonado:**

Por festi la 75-jariĝon de ILEI en decembro 2024, la eldona agado estis precipe forta ĉi jaron.

Alessandra Madella pretigis la *Aktojn de la Simpozioj de ILEI 2022-23*, kiu estis papere eldonita de Edistudio en Septembro 2024. Ekzempleroj de la libro estis senditaj al la aŭtoroj. Pliaj ekzempleroj, kiujn Alessandra Madella portos, estos senpage disponeblaj por la sekciestroj kaj komitatanoj de ILEI dum la UK de Brno (laŭ la nuna listo en la retejo de ILEI: se vi vidas eraron tie, bonvolu tuj anonci tion al ni!).

Fernando Pita baze finpretigis la unuan volumon de la Antologio de la plej bonaj artikoloj de IPR kaj la Estraro de ILEI komencis pritrakti la eblecon de publikigado kun Esperanta eldonejo.

Ĉar la lernolibro de Joel Muhire elĉerpiĝis en Aruŝo, laŭ peto de la aŭtoro ni publikigis bitan eldonon kun la ISBN-kodo de ILEI, senpage elŝuteblan el la eldona paĝo de la retejo de ILEI.

Danke al la financa subteno de Kolektivo Bernardoni, la studentoj kaj instruistoj de Esperanto en la zaozhuang-a Universitato tradukis el Esperanto al la ĉina la verkaron de la itala kuracistino Antonietta Bernardoni. La dulingva libro, kiu enhavas ankaŭ la Esperantan version el la itala originalo fare de Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch, estis publikigita kun la ISBN-kodoj de ILEI, bite en la retejo de ILEI kaj papere kun arta kovrilpaĝo.

La ISBN-kodo de ILEI estas uzita ankaŭ por la bita eldono de la Raporto pri la evento organizita de la Komisiono pri Virina Agado de UEA por la Internacia Virina Tago 2025. Ĝi senpage elŝuteblas el la retejo de ILEI.

### *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR)

La redaktoro Jozefo Németh aperigis en la organo de ILEI interesajn artikolojn pri instru-rilataj temoj. Numero estis dediĉita al la memoro de Renato Corsetti, kun interalie bela artikolo de Margherita La Torre.

### *Juna Amiko* (JA)

*Juna Amiko*, danke al la redaktoro Stano Marček, aperigis artikolojn por lernantoj.

### ILEI en la Reto

La kanalo "Esperanto + Edukado ILEI" jam havas 1 090 abonantojn. Tiu atingo estas aparte grava, ĉar kun pli ol 1 000 abontantoj, laŭ la reguloj de Jutubo, oni rajtas elsendi eventojn ankaŭ vive!

Daŭre aperas informoj pri ILEI kaj ĝiaj partneroj en kanaloj de ILEI en Fejsbuko, Jutubo, Tvitero, Telegramo, tra dissendolistoj, krom en EsperRadio kaj en la ILEI-retejo mem.

## PREMIOJ

### Premio La Torre

Omaĝe al Profesoro Maŭro La Torre (1946 – 2010), ILEI kunlaboris kun la familio La Torre por okazigi la "Premion La Torre 2024-25". Temas pri la kvara eldono de konkurso pri esplorraporto en unu el la kampoj, en kiuj Profesoro La Torre laboris. La internacia juĝkomisiono enhavis: Ahmad Reza Mamduhi (prezidanto, Mez-Azio), Renato Corsetti (Eŭropo), Bak Giwan (Orienta Azio), Dennis Keefe (Nord-Ameriko), Fernando Pita (Latin-Ameriko), A. Giridhar Rao (Suda Azio), Trevor Steele (Aŭstralio), John Magessa (Afriko) kaj Alessandra Madella (Eŭropo). Renato Corsetti bedaŭrinde forpasis antaŭ la lasta fazo de la konkurso, sed la ĵurio adoptis lian konsilon doni ankaŭ honor-atestilojn al meritaj raportoj. La anonco pri la gajninto okazis la 2025/02/28, kun solena premiado en Marto. Gajnis la unuan premion de 700 eŭroj Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau el Francio per la raporto "Takso de interreta instruado al franclingvaj lernantoj per la KER-sistemo: Post kiom da horoj de lernado de Esperanto oni atingas la nivelon A1 aŭ A2?" La gajnintoj prezentis sian raporton dum la solena premiado, kiu malfermiĝis per memoro de Renato Corsetti fare de Margherita La Torre, kaj ili sendis kopiojn de sia raporto al Esperanto-

bibliotekoj tra la mondo, laŭ la programo “Ni savu niajn semojn!”. Honoran atestilon ricevis Aranka Laslo el Serbio kaj Tatjana Loskutova el Rusio, respektive por la raportoj “Inkluzivo en retaj kursoj de Esperanto: Ekzemplo de kursaro en Serbio por miksitaj grupoj de vidantoj kaj nevidantoj” kaj “Certaj apartaĵoj de reta Esperanto-instruado.” La komisiono laŭdis la altan nivelon de la 6 raportoj, kiuj atingis la finan fazon kaj kiuj ĉiuj meritus almenaŭ publikiĝon en IPR. Estas planita ankaŭ la aperigo de antologia libro pri la Premio, al kiu familio La Torre kontribuos bibliografion de la verkoj de Maŭro.

**“Instruisto de la Jaro”**
Bone okazis la konkursoj “Instruisto de la Jaro” kaj “Juna Instruisto de la Jaro” laŭ kriterioj proponitaj de estrarano Marija Jerković kaj akceptitaj ankaŭ de TEJO por la instruisto ĝis la aĝo de 35. La internacia juĝ-komisiono enhavis Katalin Kováts (Eŭropo), Ahmad Reza Mamduhi (Mez-oriento), Jado (Orienta Azio), John Magessa (Afriko) kaj Aristóphio A. Alves Filho (Ameriko). La elekto jam okazis, sed la gajnintoj estos oficiale anoncitaj al la publiko nur dum la ILEI-Kongreso en Serbio. La premio deflanke de ILEI estos unu-jara membriĝo al ILEI kun bita IPR, unu libro eldonita de ILEI kaj atestilo. Similaj premioj estos deflanke de TEJO.

## KUNLABORO KUN ENMOVADAJ INSTITUCIOJ

### Kunlaboro kun UEA
Malgraŭ la fakto, ke bedaŭrinde pro diversaj kialoj neniu estrarano de ILEI sukcesis ĉeeste partopreni en la UK de Tanzanio, la Ligo vigle sentiĝis tie. ILEI helpis subteni la “Kongreson de Afrikaj Virinoj”, organizata de Miora Raveloharison kaj Alexandrine Omba. Pri la Movada Foiro zorgis Marija Belošević kaj Mulele Mbassa, la sekciestro de Tanzanio. Dum la malferma ceremonio, nome de la Ligo salutis ĉeeste de la podio Mireille Grosjean, kies salut-vortoj aperis poste en IPR. Prezentis ILEI-n dum du horoj en speciala programero Aurora Bute kaj Aimé Patrick Manirakiza, kun la helpo de Joel Muhire, la estro de la Konga Sekcio. ILEI organizis ankaŭ tri ĉeestajn lingvajn kursojn (vidu supre en “Kapabligo”). La “Tagon de lernado” organizis Marija Belošević. Alessandra Madella prelegis videe pri la ĉina verkisto Cicio Mar kaj liaj rilatoj kun anglaj verkistoj por la Esperantologia Konferenco. La video spekteblas en la jutuba kanalo “CED-Interlingvistiko.”

Pluraj estraranoj de ILEI prelegis dum la Virtuala Kongreso de UEA pri la *Aktoj de la Simpozioj 2022-23* kaj la ILEI-Kongreso 2025.

La retejo uea.facila publikigis rakonton de Alessandra Madella pri ŝia vizito al mezlernejo en Ĉinio por propagandi Esperanton kun ĉinaj kolegojn, kaj pliajn artikolojn de Ahmad Reza Mamduhi, kelkajn verkitajn kun Renato Corsetti.

Pluraj ILEI-aninoj estas komitataninoj de la restariĝinta komitato de UEA pri “Virina Agado” (Arko, Malgosia Komarnicka, Alessandra Madella, Miora Raveloharison, Ariadna Garcia Gutiérrez), aŭ parto de ĝia konsilantaro (Anna Löwenstein, Mirejo, Luiza Carol, Maritza Gutierrez, Alexandrine Omba).

En Decembro 2024, ILEI partoprenis en la celebrado de la Deklaracio de Montevideo favore al Esperanto, kune kun UEA, TEJO kaj la landa E-asocio.

La observanto de ILEI ĉe UEA estis daŭre Ahmad Reza Mamduhi. La observanto de UEA ĉe ILEI estis daŭre Aurora Bute.

**Kunlaboro kun TEJO**
Pri la premio "Juna Instruisto de la Jaro", vidu supre.

La reprezentanto de TEJO ĉe ILEI estis Espoir Ngoma Kasati, dum la reprezentanto de ILEI ĉe TEJO estis Aimé Patrick Manirakiza.

Alessandra Madella estis parto de la ĵurio de la dua eldono de la scienca konkurso KonSciu, organizita de TEJO kadre de la Virtuala Kongreso de UEA. La tri junaj gajnintoj iĝis senpage membroj de ILEI-sekcioj (svisa kaj itala), kun ricevo de bita IPR.

**Kunlaboro kun edukado.net**
La sukceso de la konkursoj "Instruistoj de la Jaro" antaŭvidigas daŭran kunlaboron kun Katalin Kováts, kiu varbadis pri ili en edukado.net kaj havas plurajn proponojn por plibonigo en la venontaj jaroj, kun la celo plilarĝigi kiel eble plej multe la partoprenon de elstaraj instruistoj.

**<u>KUNLABORO KUN EKSTERMOVADOJ INSTITUCIOJ</u>**

**Kun UNESKO**
La reprezentantoj de ILEI ĉe UNESKO estis Emmanuel Desbrières, Maximiliano Garcia, Alessandra Madella kaj Didier Janot.

**Kun FIPLV (kaj FUEL Magazine)**
Daŭras la kunlaboro kun Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj (FIPLV), kies membro ILEI estas. La kontaktpersono estas la prezidanto Ahmad Mamduhi. Alessandra Madella verkis por la Bulteno de FIPLV artikolojn pri la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23* kaj sia februara prelego ĉe la Universitato de Milano. Tiu ĉi lasta artikolo, kun permeso de FIPLV, estis represita en la brita revuo por universitatanoj FUEL Magazine, kiu jam parolis pri Esperanto en tri numeroj. Ahmad Mamduhi donis belan intervjuon por FIPLV, en kiu li parolis interalie pri la konkursoj "Instruistoj de la Jaro" kaj la ebla rolo de AI en instruado. La bultenoj senpage elŝuteblas el la retejo de FIPLV.

**Kun Ĉina Komunikila Grupo**
Alessandra Madella daŭre aperigas artikolojn en la retejo de Ĉina Komunikila Grupo (Ĉina Radio Internacia). Artikoloj iris de la rondiranta rakonto "Pri Viroj kaj Kunikloj" al la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI*, de la konferencoj de Milano kaj Zaozhuang al la evento "Teo kaj Amo: Floraj Ludoj", organizita de la Esperanto-Asocio de Parmo ĉe la loka Muzeo pri Ĉina Arto kaj Etnografio, kun la kunlaboro de la Esperanto-grupo de Tianjin. Intervjuoj estis, interalie, al Ĵenja Amis pri "1910", al Mirolav Malovec pri la Esperanta ponto de ĉinaj tradukoj el la ĉeĥa literaturo, al Paola Bertolone pri la jida teatro kaj al Olta Totoni pri la uzo de Esperanto en Fuel Magazine.

**Kun Universitato Adam Mickiewicz, Pollando**

ILEI morale subtenis la gravegan instruadon de Interlingvistiko kaj Esperantologio fare de Ilona Koutny kaj ŝiaj helpantoj. Alessandra Madella estis en la komisiono por la finaj ekzamenoj de la studentoj de tiuj fako kaj magistra kurso, kiuj certe markis la historion de la instruado en kaj per Esperanto kaj reprezentas malfacile superеblan modelon.

**Kun la Universitato de Zaozhuang, Ĉinio**

ILEI daŭre morale subtenas la agadojn de la 4-jara Esperanto-fako kaj de la loka Esperanto-Muzeo. Alessandra Madella daŭre instruas kursojn en Esperanto al la studentoj de la Esperanto-fako kaj de Esperanto al la studentoj de scienco kaj teknologio. Pasintan semestron ŝi instruis Esperanton ankaŭ al la 40 volontuloj de la Esperanto-klubo de la nova kampuso. Kun studentoj kaj instruistoj de Zaozhaung-a Universitato ŝi partoprenis en la 3-a Japana-Korea kunkongreso kaj en la evento por la 40-jariĝo de la Esperanta Klubo de Tonglu, ĉiam salutante la publikon nome de ILEI, verkante artikolojn kaj farante videojn.

**Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Vic-prezidanto de ILEI: Alessandra Madella

Prezidanto de ILEI: Ahmad Reza Mamduhi

2025-07-6